

27a jarkolekto - decembro 2006/12

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

Glaciskulptado

Religioj en Bulgario



Ĉu paco venas en Eŭskion?

La jaro 2007

Via poŝtamiko dum la tuta jaro 2007 (kaj pli)



Poŝkalendaro

- kun spaco por fari notojn,
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

Enciklopedieto

- kun la ŝtatoj de l' mondo,
- kun ĉefurboj, loĝantoj, surfaco ktp ktp,
- kun indiko kiel telefoni el kaj al eksterlando
- kun radioprogramoj en Esperanto
- kaj multe pli

Mendu ĝin tuj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000, Antwerpen, Belgio
retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto
(vidu liston kaj prezojn en p. 4).

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun por la 3 venontaj jaroj (5 % da rabato) aŭ por la 5 venontaj jaroj (10 % da rabato!).

Paŝoj al (mal)paco

En majo 2005 la hispana parlamento permesis al la registaro ekdialogi kun la eŭska sendependiga movado ETA, sed nur kiam ĉesos perfortoj. Ĉi tiun paŝon al paco rigardis la hispana popolo kaj kun espero kaj kun zorgoj. En marto 2006 ETA deklaris paf-ĉesigon.



8

POLITIKO

Hispanio	8
Paŝoj al (mal)paco	
Ĵurnalismo	9
„Pac-peranto” liberigita	
Makedonio	9
Konfuzo postbalota	

MODERNA VIVO

Demografio	10
Enmigrado - anta kaj inta	
Kuirarto	12
Plezuro elsakigita	
Albanio	12
Politiko duondetruita	
Aviadila sekureco	12
Pordo al danĝero	
Vatikano	13
Sekretoj studeblaj	
Aŭstrio	13
Postulataj: pli severaj punoj	

HOBIO

Finnlando	14
Glaciskulptado	
Interreto	16
Interrete ankaŭ per naciaj literoj	

LIBROJ

Pro multe da arboj	17
Unu el kvar	18

ESEO

Nobelpremioj	19
Alfred Nobel: nobelo inter la sciencistoj kaj la lingvistoj	

SPIRITA VIVO

Opinio	22
Toleremo kaj liberecoj en Nederlando	
Religioj en Bulgario	24
Mia religio	26

Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj	6
El mia ridpunkto	7
Anoncetoj	27

Glaciskulptado

Skulptado de figuroj el glacio ĉiam pli populariĝas en Nordio. Amatoraj glaciskulptantoj spertigas sin reciproke dum pluraj konkursoj, kiuj okazas ĉiuvintre. Iliaj laborinstrumantoj estas motorsegiloj, hakiloj, marteloj, ĉiziloj, skrapiloj. Ofte la skulptantoj mem elpensas kaj faras la plej bonajn skulptilojn.




14

Alfred Nobel: nobelo

inter la sciencistoj kaj lingvistoj

Ĵurnalistoj nomis Alfred Nobel „la vendisto de la morto”, „la viro, kiu faris la militon profitdona”. Kaj tiu Alfred Nobel estis ĉe la bazo de la ĉiujare atribuita pacpremio ... lom malfacile kompreneble? Aŭ tamen ne ...



19

Religioj en Bulgario

La 13an de marto en la rusa kultura-informa centro (RKIC) en Sofio okazis akademia konferenco pri la temo „La religioj en Eŭropo kaj la estonteco de la ortodoksa kristanismo”, organizita de la RKIC kaj de scienca-esplora grupo pri religiaj-filozofiaj paradigmoj, konsistanta el instruistoj en kelkaj bulgaraj universitatoj.



24

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadatan fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al reĉbutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO		La Jaro aere		
	surface	aere	1 fojon monate	tuj	
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6.5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugaliao	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ermits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Hilde Maul, Pferserer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Italaj:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosa 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japanaj:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatf@shaw.ca.
- **Katalunaj:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroataj:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latvaj:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litovaj:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: laimius@fastlink.lt.
- **Luksemburgaj:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlandaj:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvegaj:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usonaj:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org



Lern-fiasko

En la junia numero mi raportis pri problemoj de germanoj pri la propra lingvo kaj ligite al tio pri la angla („Germana batalo”, MONATO, 2006/6, p. 7). Mi citis sciencistojn, kiuj kritikis la troan aŭ preskaŭ ekskluzivan uzadon de la angla en scienco kaj diris, ke 30 % de la germanoj tute ne scias la anglan, pliaj 30 % nur rudimente (tio estas, ili lernis, sed ne scias ĝin). El tio oni povus konkludi, ke unu triono de la germanoj scias la anglan. Tion tamen kontestas nova esploro, kiu enketis 3700 studentojn pri angla lingvo. 34 % asertis, ke ili tre bone scias ĝin, 38 % diris bone. Sed postaj lingvotestoj montris: nur 1 (unu!) % scias la anglan tre bone, nur 4 % bone kaj 76 % kontentige (do nebone). Atentu: temas nur pri studentoj (do la elito), ne pri germanoj ĝenerale. Tiuj studentoj dum 8 ĝis 10 jaroj intense lernas la anglan. Oni do povas paroli nur pri grandioza fiasko de instruado kaj lernado de la angla, se oni vidas tiujn rezultojn. Tio ne povas mirigi, ĉar kontraste al ofte esprimata kontraŭa aserto, la angla por germanoj estas tre malfacila lingvo.

Spite al tio tamen precipe politikistoj en Germanio plu kaj pli kaj pli favoras lernadon de la angla. Günther Oettinger [ginter étinger], kristandemokrata ministroprezidanto de la federacia lando Baden-Virtembergo, pledante por instruado de la angla, argumentis jene: „La angla fariĝas la laborlingvo. La germana restas la lingvo de familio kaj libertempo, la lingvo, per kiu oni legas private.” Laŭ li do la germana reduktiĝu al ludodialekto. Privilegion kaj avantaĝon aŭtomate havas per uson-angla lingvo tiuj homoj, kies gepatra lingvo ĝi estas, dum ĉiuj aliaj pene devas lerni ĝin, elspezante gigantajn energiojn, tempon kaj monon. Britoj kaj usonanoj devas lerni neniun fremdan lingvon kaj povas investi energiojn, tempon kaj monon por aliaj aferoj kaj tiel facile superi ĉiujn aliajn ekonomie kaj kulture. Ne malprave tial oni diras, ke tiel nomata tutmondiĝo fakte estas nenio alia ol usonigado de la cetera mondo. Estas por mi ĉiama enigmo, ke la homoj kaj precipe politikistoj ne ekkonas kaj ne perceptas tiun ĉi evidentan maljustaĵon.

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Librecozonoj oni ne sendu al la redaktoro proprainicite. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Koptaj evangelioj

La teksto sub la lasta bildo de la artikolo *Maria Magdalena: ĉu edzino aŭ ne?* (MONATO 2006/8-9, p. 25-26) ne estas ĝusta. Aperis en Esperanto ne kopta biblio, sed nur traduko de kelkaj koptaj evangelioj. Kelkaj – apokrifaj – evangelioj ja absolute ankoraŭ ne estas tuta biblio.

Gerrit BERVELING
Nederlando



Evoluo vivas ne en la reto

Zlatko Tišljár (MONATO, 2006/10, p. 9) estas scivola pri nia opinio, sed per la frazo „Eble valorus malfermi interretan forumon por interŝanĝi ideojn” tuj forpuŝas la ne-retulojn. Mi, ne-retulo, sentas la evoluon. La komenciĝanta revolucio okazu ne sur la batalkampoj, sed en nia sino, ĉar ni klare vidas, ke la aktuala sistemo kraŝe kuras al muro. Interreto ne naskas novan senton, eĉ se jam ĝi utilas por disvastigi informojn. Ni ne vidu la reton kiel novan religion. Evoluo vivas ne en la reto, sed en nia menso, kiu aŭskultas la koron.

Michel MARKO
Francio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Ĉu lingvoj formortu?

Laŭ Elvia Belluco (MONATO 2006/10, p. 7) oni rajtas nomi lingvo nur tiun sistemon, kiu tri kondiĉojn plenumas: funkcii kiel amaskomunikilo; deponi kulturon en bibliotekoj de originalaj aŭ tradukitaj verkoj; speguli la personecon de la koncerna lando. Laŭ tia vidpunkto, neniu el ĉirkaŭ 160 indiĝenaj popoloj de mia lando (Brazilo) komunikigas per „lingvo”. Laŭ ĝi la antikvaj parolsistemoj antaŭ la genia ilo de Gutenberg neniam estis veraj lingvoj. Kaj mi ne forgesas Esperanton. Kiel nomi ĝin lingvo, se mi uzus tiel rigoran metodon taksi? De kiu lando Esperanto spegulas la personecon?

Mi preferas la pensmanieron de la brazila konstitucio en kiu troviĝas: „La fundamenta regula instruado devas esti farita per portugala lingvo, sed estu assekurite al indiĝenaj komunumoj ankaŭ la uzado de iliaj gepatraj lingvoj kaj de propraj instruprocezoj.” Ne gravas, se indiĝena komunumo sumas dek unu aŭ dek mil parolantojn. Lingvo estas „Sistemo da vortoj uzata de iu nacio aŭ gento por interkompreniĝo” (Revo). Kiam formortas unu lingvo, kune mortas parto de la homa vivo.

José LEITE DE OLIVEIRA Junior
Brazilo

Ĉu lingvoj formortu? (2)

Legante la titolon „Lingvoj formortu senprobleme”, per kiu vi prezentis leteron de Elvia Belluco (MONATO 2006/10, p. 7), mi ŝokite pensis: nu, jen persono, kiun tute ne tuŝas la lingva katastrofo, okazanta sub niaj okuloj!

Sed poste, atente legante la leteron, mi konstatis, ke verŝajne ĝi esprimas la malon. Laŭ mia kompreno, E. Belluco bedaŭras, kiel ni ĉiuj, pri la grava fenomeno; ĝuste tial ŝi proponas: oni haste kolektu skriban ateston pri tiuj lingvoj, kiuj verŝajne baldaŭ mortos, por ke almenaŭ dokumenta memoro restu pri ili!

Filippo FRANCESCHI
Italio

La dilemo de la homaro

Pli kaj pli evidentiĝas, ke granda parto de la homaro jam rezignis akiri veran demokration, tio estas politikan kaj ekonomian demokratiojn. Decidojn ne vere faras la ŝtatoj aŭ popolanoj, sed pli kaj pli senĝene la posedantoj de grandaj entreprenoj kaj entreprenĉenoj. La demokratiaj ŝtatoj permesas al siaj anoj liberajn elektojn kaj balotojn, sed la elektitoj ne plu traktas serioza la volon de la balotintoj. Gravus nur la bonfarto de la entreprenposedantoj (grandakciuloj). Tiuj jam mondscale agas, dum la plej granda parto de la homaro ankoraŭ pretas senhelpe subiĝi naciajn kaj regionajn malefikajn decidojn. La tiel nomata tutmondigo evidentiĝas esti nenio alia ol subordigo al la interesoj de la restinta granda potenco Usono.

La sola kontraŭstaro venas de islamaj popoloj, kies estroj decidas laŭ la volo de dio. Sed la volon de dio ne eblas regi aŭ pridemandi, do restas nenio alia ol la plenumo de la volo de la potencohavantoj. Kaj jen kia koincido. Tiel ne eblas veni al vera demokratio, sed nur al sufero kaj detruo.

Nur demokratiaj decidoj surbaze de raciaj kaj science bazitaj komunutilaj agoj gvidos al bonfarto de la tuta homaro. Sed ŝajnas, ke la homaro ne (plu) volas tion. Kiel estus cetere klarigeble, kial tiel multaj admiras religiajn gvidantojn, kiuj neniam kontribuis al progresigo de demokratio, sed male al stagnigo kaj eĉ malprogresigo.

Franz KNÖFERL
Germanio

Du mil ses

de Stefan MAUL

Pri politikistaj mensogoj ni skribis ĉi-loke plure ekzemple pri mensogoj de usonaj prezidantoj Bill Klintono en seksoskandalo kaj Ĝorĝ Dablju Buŝ pri Irak-milito. Sed ĉi-jare okazis ĉi-kampe io nekredbla: politikisto diris mem, ke li (kaj lia partio) mensogadis kaj mensogadas. Hungara ĉefministro Ferenc Gyurcsány [djurĉanj] konfesis tiun ĝeneralan veron, kaj la mondo miris. Sed ni miris ankaŭ pri la reagoj de la publiko hungara: la pompe trompitaj kaj nun klare klerigitaj elektintoj ne dankis pro la vero, sed protestis. Tio certe konfirmos la konvinkon de politikistoj mondwide, ke ili ne diru la veron, sed pravas brave mensogi. La publiko evidente atendas nenion alian.

Science mensogi

Ke statistiko estas la scienca metodo por mensogi, tion ni ankaŭ scias. Sed kion pensi pri statistikistoj, kiuj asertas, ke la 17an de oktobro 2006 ekzakte je 7.46 h de usona orientborda tempo la usona loĝantaro atingis la nombron 300 milionoj? Ili tamen ne sciis, ĉu la 300-miliona usonano estas novnaskito, ĉu nigra aŭ blanka homo, aŭ ĉu estas enmigrinto laŭleĝa aŭ kontraŭleĝa. Mi asertas, ke tiun nombron Usono atingis jam antaŭ unu jaro aŭ eble post unu jaro – kiu povus pruvi, ke mi eraras?

Mensogis ankaŭ germana bulvardĵurnalo *Bild*, kiu jubilis „Ni estas papo!” Kompreneble ne la germanoj fariĝis papo, sed nur unusola Josef Ratzinger [racinger], kiu krome malpli estas germano ol bavaro. Alia afero estas, ke nuna Benedikto 16a en sia blazono havas urson; ĉu eble tial somere el Italio venis problem-urso Benno Bruno, kiun pafmortigis bravaj bavaraj ĉasistoj, por ke la papo dum sia vizito en aŭtuno ne

riskus danĝeran renkontiĝon kun reala urso?

Pro la krititolo de *Bild* supozeble palaj poloj ĉi-jare ne estis tre afablaj al germanoj, precipe tiuj katolikegaj ĝemeloj, kiuj havas nomon similan al „Kaĉ-sinki” kaj nun duope regas Pollandon (unu prezidanto, alia ĉefministro), daŭre riproĉis ion al Germanio. Imagu, se ne estus ĝemeloj, sed trinaskitoj – sendube la tria estus papo!

Ofendiĝoj

Sed nun ni do havas ne-polan papon, kiu eĉ estis nazio, se ni volas kredi al brutalaj britaj bulvard-gazetoj. Tiuj post elektiĝo de Benedikto 16a malkovris, ke li estis „Hitler-knabo”, kiel milionoj da germanaj junuloj. Sed la aliaj milionoj ne arogis al si fariĝi papo! Benedikto 16a dum universitata prelego en Germanio tamen ne atakis judojn, kiel decus al nazio, sed islamanojn, citante iun mezepokan monarkon, kiu asertis, ke islamo estis tiam perfortema. Tiun prelegon laŭdis eĉ islamaj teologoj, kiuj ĉeestis ĝin, sed tuj poste ĉiuj aliaj islamanoj, kiuj ne aŭdis la papajn vortojn, surstrate protestis en tuta la mondo kontraŭ tiu papo kaj volis sendi lin al la infero, laŭ afiŝo vidita en Britio. Li ne iris tien, sed provis klarigi, kion li vere diris, kaj iom post iom islamanoj trankviliĝis – ĝis nova ofendo.

Kion ni lernas el tio? Ke ni rajtas nek kritiki nek moki pri islamanoj, ĉar ili facile emas ofendiĝi. Mirigas min tamen, ke en Germanio islamanoj akceptas ĉiujare en decembro „kristnask-monon” sen ofendiĝo; tiun ekstran salajron oni pagas en Germanio, por ke kristanoj digne povu festi Kristnaskon. Mi konsilas, ke por islamanoj en Germanio oni transigu tiun almozon al la koncerna

fast-monato kaj nomu ĝin „Ramadan-mono”. Ĉar, kiel ĉi-jare informis abunde turkaj amaskomunikiloj, islamanoj devas elspezi multan monon por fastado, pli ĝuste por postfasta fazo de tago. Ili nek manĝas nek trinkas dum la tago, pro kio kolapsis eĉ turka ĉefministro, sed post malapero de suno sunaistoj same kiel ŝijaistoj diboĉas ekstreme, manĝante kaj trinkante dum la tuta nokto, ĝis ili matene povas distingi blankan de nigra fadeno. Kontraste al usonanoj, kiuj parolas pri „fast food” (rapidnutraĵo), islamanoj do havas sian fastonutraĵon. Ni neniel volas kritiki aŭ moki pro tio, sed ni nur citas avertojn de nutrospecialistoj en turkaj gazetoj, kiuj diris, ke tia diboĉado damaĝas sanon – simile kiel ĉe kristanoj, kiuj diboĉas dum Kristnaskofesto (ne Krisnasko-fasto!).

Mezepoka metodo

Problemon pri islamo, pli ĝuste pri islamistoj, kiel konate, havas ankaŭ Buŝo en Irako. Ili simple ne volas akcepti lian predikon pri demokratio kaj daŭre bombatakas la okupaciajn trupojn kaj proprajn popolanojn. Tial nun usonaj militistoj refalis en mezepokon; tiam urbojn oni protektis kontraŭ malamikoj per altaj muroj kaj profundaj fosaĵoj kun akvo. Tiujn volis instali Usono ankaŭ ĉirkaŭ la iraka ĉefurbo Bagdado. Grandioza plano, ĉu ne? Kiam la fosaĵo estos preta, fine usonaj trupoj povos revojaĝi hejmen.

Cetere ni devas priplori gravajn perdojn: malaperis en Sensignifolandon miaj du plej dorlotitaj politikaj harlekenoj, aŭstra Jorgo Hajdero kaj itala Silvio Berluscono. Nu ja, daŭre restas multaj aliaj politikistoj, pri kiuj ni povas ridi. Eble en 2007 eĉ aperos novaj. Ni rajtas esperi! ■

Paŝoj al (mal)paco



Policistoj subpremas surstratajn protestojn en Eŭskio, sur la muro legeblas Batasuna antaŭen.

En majo 2005 la hispana parlamento permesis al la registaro ekdialogi kun la eŭska sendependiga movado ETA, sed nur kiam ĉesos perfortoj. Ĉi tiun paŝon al paco rigardis la hispana popolo kaj kun esperoj kaj kun zorgoj.

En marto 2006 ETA deklaris pafĉesigon. Poste ĝi petis, ke Eŭskio mem decidu pri siaj aferoj, ke elprizonigitaj estu aktivuloj, kaj ke la politika alo de ETA, la kontraŭleĝa politika partio *Herri Batasuna* (Unueco), estu laŭleĝigita.

Komence ĉio ŝajne glatis. La proponojn apogis la hispana prezidento

de la registaro José Luis Rodríguez Zapatero [ĥosé lúis rodriges sapaterto] kaj ĉiuj politikaj partioj. La polico raportis, ke pafĉesigo ja realiĝis, kaj la socialista partio de Rodríguez Zapatero komencis intertrakti kun *Herri Batasuna*.

Stratluktado

Sed en junio Mariano Rajoy [raĥój], ĉefo de la opozicia Popola Partio, anoncis, ke la partio ne plu subtenos la pac-iniciaton. Kaj malgraŭ tio, ke la prezidento de la registaro deklaris, ke ekis dialogoj kun ETA, en aŭgusto tiu informis, ke la procezo krizas. Tuj poste



La dekstrisma Popola Partio kaj ties afinaj asocioj de viktimoj de la terorismo, kune kun aliaj hispanismaj organizoj fervore opozicias la pacprocezon

komenciĝis la *kale borroka*: eŭsklingve stratluktado, starigo de barikadoj kaj ĵetado en eŭskaj urboj de brulboteloj, la Molotov-kokteloj.

Leviĝas demandoj, kial la pac-iniciato stumblis. La Popola Partio retiris sian eventualan apogon tuj post la aserto de Rodríguez Zapatero, ke la registaro ekstraktos kun ETA. Cetere la registaro ne plene informis la opozicion pri siaj planoj: tiu sentis sin izolita. Kaj ambaŭ partioj provis ekspluati la procezon pro propraj politikaj motivoj.

Verŝajne oni ne progresos, ĝis la registaro insistos pri transdono de ĉiuj armiloj, kaj ĝis *Herri Batasuna* publike kondamnos perforton. Nur tiam, eble post longa tempo, okazos paco.

Santiago LÓPEZ FERNÁNDEZ-AGUADO

„Pac-peranto” liberigita

Saviĝis kuraĝa slovena ĵurnalisto post preskaŭ dumonata enkarcerigo en Sudano. Tomo Križnar, arestita en julio kaj kondamnita al dujara malliberiĝo, hejmeniris komence de septembro post diplomataj intervenoj de Slovenio.

Križnar estas konata en Slovenio kiel ĵurnalisto, kiu dum pli ol 20 jaroj batalas por savi la aŭtoktonajn neislamajn popolojn en Sudano. Li faris plurajn ekspediciojn kaj filmis televidajn raportaĵojn. Li esploris la centran sudanan montaron, kie antaŭ dudeko da jaroj vivis du milionoj da Nuba-nigruloj, konataj pro natura kaj ekologia vivmaniero.

En filmo farita antaŭ ok jaroj Križnar montris, ke vivas en la montaro nur kvarono de la antaŭa Nuba-popolo. La sudana islama ŝtato daŭre ilin atakis, celante devigi neislamajn nigrojn islamiĝi aŭ foriri.

Genocido

Simila situacio dum la lastaj jaroj okazas en la regiono Darfur. Križnar decidis refoje iri al Sudano kaj atesti pri la genocido. Vizon, sed ne rajton li ricevis por iri al Darfur. Kiam li klopodis kontraŭleĝe eniri, sudanaj soldatoj arestis lin.

La enkarcerigiton morale subtenis la slovena ŝtatprezidanto Janez Drnovšek, kaj la slovena ŝtato esploris diplomatajn eblojn por lin liberigi, sciante, ke Križnar verŝajne ne transvivos du jarojn en sudanaj malliberejoj.

Alveninte al Ljubljano, Križnar diris: „Mi ĉiam sentis min peranto por paco. Limoj estas transirendaj, aparte se malantaŭ ili troviĝas suferantaj infanoj kaj virinoj. Mi klopodis ion fari, por ke la mondo komprenu, ke Slovenio estas lando, kiu ne indiferentas pri evidentaj malbonoj.”

Zlatko TIŠLJAR



Križnar estas konata en Slovenio kiel ĵurnalisto, kiu dum pli ol 20 jaroj batalas por savi la aŭtoktonajn neislamajn popolojn en Sudano.

MAKEDONIO

Konfuzo postbalota

Venkis en balotoj en Makedonio la makedon-etna dekstro, gvidata de Nikola Gruevski, kaj la alban-etna maldekstro, gvidata de Ali Ahmeti. Sed Gruevski, la nova ĉefministro, elektis por sia koalicia registaro ne la partion de Ahmeti, sed tiun de Arber Xhaferi [dĵaferi], kiu estas same alban-etna, sed dekstra, kaj natura partnero en dekstrema registaro.

Influis la decidon tio, ke la partio de Ahmeti estas kreita de eksaj ribeluloj. En 2001 la Nacilibera Armeo renver-

sis la dekstran partion makedon-etnan kaj tiel ebligis, per la Interkonsento de Ohrid, pli da rajtoj por albanoj.

Humiligite, Ahmeti instigis dek-milojn da albanoj plenigi la placojn kaj manifestacii kontraŭ la registaro. Tiel evidentas, ke albanoj en Makedonio ne sukcesis fondi propran etnan koalicion por garantii al si pli da etnaj rajtoj. Kaj ankoraŭ ne tute plenumiĝis la Interkonsento de Ohrid, pri kiu la nova ĉefministro ŝajne indiferentas.

Bardhyl SELIMI

Enmigrado - anta kaj inta

Mi loĝas en malgranda kampara urbo en la mezo de Irlando. Antaŭ malmulte da jaroj la tiea etoso estis vilaĝeca. La urbeto situas for de vojoj, kiuj kondukas al la popularaj turismaj regionoj, kaj do estis malofte vizitata de eksterlandanoj. La plimulto de la junularo ne restis en la urbo post la studado: preskaŭ ĉiu, kiu havis iom da ambicio, elmigris al pli promesplenaj landoj. Ankaŭ miaj tri filoj devis serĉi novan vivon en fremdaj landoj.

Tamen, post la prospero, kiu sekvis la aliĝon de Irlando al la Eŭropa Komunumo (nun Unio), ĉio transformiĝis. Anstataŭ amasa elmigrado, Irlando iĝas fokuso de enmigrado. Miloj da homoj el landoj, kiuj suferis de alta senlaboreco, alvenis por tie labori. La plimulto venis de Pollando, sed en nia urbo plej multnombraj estas litovoj kaj latvoj. Ankaŭ brazilanoj enmigris por labori en la lokaj viandprilaborejoj. Malpli multnombraj, tamen videblaj, estas afrikaj enmigrintoj.

Tiuj ĉi enmigrintaj komunumoj sufiĉe grandas por influi la socian kaj religian vivon de tradicia kaj konservativa socio. En la katolika preĝejo regule okazas meso en la pola lingvo, dum en la presbiteriana preĝejo ĉiusemajne

estas diservo en la portugala por la brazilanoj. La afrikanoj havas sian propran diservon en la forstisto-klubo.

Nova Babelo

Eldoniĝas en Irlando ankaŭ ĵurnaloj en la pola kaj rusa, kaj la enmigrintoj havas siajn komunumajn centrojn kaj rondojn. Do en lando, kie antaŭ nelonge nur la angla kaj la irlanda estis parolataj, kaj preskaŭ la solaj fremdaj vizitantoj estis irland-devenaj usonanoj serĉantaj familiajn radikojn, estiĝis nova Babelo kaj multe pli bunta kaj interesa socio. Kiom longe daŭros tiu ĉi situacio, ne klaras, ĉar kelkaj timas, ke la venonta enlaso de Bulgario kaj Rumanio en Eŭropan Union (EU) malekvilibrigos la labor-merkaton. Tamen, ĝis nun, ĉiu civitano de EU rajtas loĝi kaj labori sen permeso en Irlando.

Nuntempe en nia urbeto estas tri vendejoj, kiuj vendas produktaĵojn el orient-eŭropaj landoj, nome *Litas* (litova), *Kaunas* (litova) kaj *Medvedj* (latva-rusa). Ĉiuj vendas tipajn manĝaĵojn kaj aliajn specialaĵojn el la baltaj ŝtatoj kaj el Rusio, kaj laŭŝajne estas sufiĉe da klientoj en ĉiu vendejo.

La plej videbla enmigrinta grupo estas la litova. Kvankam ŝajnas, ke la plimulto de la litovoj devas akcepti

modestajn kaj ne tre bone pagatajn postenojn ofte sub siaj kapabloj kaj klerecnivelo, la enmigrintoj konstatas, ke ili povas perlabori multe pli, ol en siaj respektivaj landoj. Aliflanke la vivkostoj en Irlando estas altegaj kaj konstante pliiĝas. Litova najbaro, muzikisto, laboras kiel ĝardenisto, kaj sukcesis post tri aŭ kvar jaroj ŝpari sufiĉe da mono por aĉeti kelkajn hektarojn en Litovio. Liaokaze eble ne ĝustas priskribi lin kiel enmigrinton, ĉar post iom da tempo li verŝajne reiros kun sia familio al sia lando.

Ĉerkoj

Bedaŭrinde, neproporcie granda nombro da litovoj mortas aŭ estas vunditaj en aŭtomobilaj akcidentoj. Ŝajne ili ne facile al kutimiĝas al la maldekstraflanka stirado aŭ al la multaj mallarĝaj kaj ofte danĝeraj kamparaj ŝoseoj en Irlando, kie oni ne povas rapide veturi sen riski la vivon. Krome tro da homoj (kaj en- kaj eksterlandanoj) ŝoforas post drinkado. Irlanda ministro antaŭ nelonge diris: „Ni ne volas resendi pli da litovoj en ĉerkoj al ilia lando.” Kompreneble ne nur litovoj mortas pro la preskaŭ ĉiutagaj akcidentoj.

Migrado el Litovio kaj el aliaj landoj al la okcident-eŭropa insularo ne estas tute nova. Antaŭ kelkaj jaroj mi estis invitita de geamikoj en najbara Skotlando partopreni kunvenon en la industria urbo Motherwell [máderüel] iom sude de Glasgovo. Temis pri evento por memori la kontribuadojn de enmigrintoj helpe al la industria disvolvo de la regiono. Inter la du mondomilitoj, la ekonomio de Motherwell kaj ties ĉirkaŭaĵo estas bazita sur fandejoj kaj karbominejoj.

Dum tiama tempo de malfavora konjunkturo la dungantoj ne volis pagi vivtenantajn salajrojn al skotaj labor-





istoj. Do ili rekrutigis el Litovio ĉefe agrikulturajn laboristojn sen spertoj pri peza industrio. Multaj venis al Motherwell, kie ili suferis pro malsanigaj laborkondiĉoj, nesufiĉa mono kaj diskriminacio flanke de skotaj laboristoj, kiuj sentis rankoron kontraŭ homoj pretaj akcepti salajrojn, kiujn ili konsideras neindaj. Por iom eviti la diskriminacion, kelkaj litovoj prenis pli skotsimilajn nomojn kaj efektive integriĝis en pli vastan skotan komunumon. Almenaŭ unu domo en Motherwell ankoraŭ portas litovan nomon.

Memoriga parko

La litovoj ne estis la solaj enmigrintoj en Skotlandon en tiu ĉi periodo. Sekvis alvenintoj el Irlando, Italio kaj aliaj eĉ pli malriĉaj landoj. La plej evidenta postsigno de la intermitita enmigrado estas urba ekspoziciejo, memo-

Videblas pro la nomoj super la butikoj en irlanda urbeto, ke jam enhejmiĝis pluraj familioj el meza kaj orienta Eŭropo.

riga parko kaj katolika informcentro fondita de irlanda katolika pastro. Ĉirkaŭ la parko estas etaj sanktejoj aŭ grotoj por ĉiu enmigrinta komunumo: litova, pola, irlanda ktp – ĉiuj portantaj surskribojn en la koncerna lingvo. La pola sanktejo inkluzivas monumenton al la viktimoj de naziismo. En la informcentro oni povas spekti filmon pri rilataj temoj.

Oni esperas, ke la sperto de la litovoj kaj aliaj enmigrintoj kaj „gastlaboristoj” en hodiaŭa Irlando estos pli kontentiga kaj malpli peniga, ol tiu de la familioj, kiuj loĝis en Skotlando dum tiu ĉi malĝoja periodo. Ĉiuokaze ŝajnas, ke la grandaj demografiaj ŝanĝoj en Eŭropo kaj en la cetera mondo daŭros kaj kreskos.

Garbhan MacAoidh

KUIRARTO

Plezuro elsakigita



Manioko-folioj, kiam bone preparitaj laŭ strikta recepto, multe plaĉas al konganoj ambaŭborde de la rivero Kongo. Nepras pisti la foliojn, ĝis ili fariĝas preskaŭ verda kaĉo; kaj la bruo de la pistado signifas al la konganoj, ke tiel prepariĝas tio, kion ili konsideras la nacia plado.

La manĝaĵo ricevas plurajn nomojn. En Kongo-Brazavilo oni nomas ĝin, depende de la loka lingvo, *saka-saka*, *ntoba* aŭ *pondu*. Oni preparas ĝin tre sperte; kaj en la kuirpoton, kun la manioko-folioj, eniras ekzemple palmoleo, bulboj aŭ bulbetoj, aŭ fiŝaĵo. La rezulto bongustas. Se necesas iam plezurigi konganon, konsilindas proponi al tiu belan pladon da *saka-saka*.

Jean-Louis MADZELLA/pg



ALBANIO

Politiko duondetruiita

Super la kapoj de preterpasantoj pendas, damokloglave, restaĵoj de duondetruiita konstruaĵo.

Post 1990 ankaŭ en Albanio oni multe konstruis, ekzemple domojn, butikojn, restoraciojn, tamen senpermese kaj malkonforme al la reguliga plano de la koncernaj loĝlokoj.

Kiam la ŝtato plifortiĝis, ĝi komencis detrui ĉiujn nepermesitajn konstruaĵojn. Sed, ĉar malabundas rimedoj por forigi la ruinojn kaj ĉion poste ordigi, dum abundas konstruaĵoj tiaj, restas dum jaroj duondetruiitaj loĝejoj, kiuj malbeligas la ĉirkaŭaĵon kaj eĉ endanĝerigas la vivon.

Bardhyl SELIMI

AVIADILA SEKURECO

Pordo al danĝero

Aviadilon survoje inter Albanio kaj Turkio kaptis en oktobro nearmita turko. Li devigis la piloton flugi al Italio, celante Romon kaj dirante, ke li havas mesaĝon por la papo. Tamen la aviadilo alteriĝis en Brindisi, en suda Italio, kie la aerpirato cedis al la polico, petante azilon. Neniu el la 113 ostaĝoj en la aviadilo vundiĝis.

La turko, dizertinto el la turka armeo, loĝis plurajn monatojn en Tirano, Albanio, kaj tie petis azilon, kiu estas rifuzita. Li decidis reveni Turkion

sed en la aviadilo, trovinte la pordon al la pilotejo malfermita, li minacis la pilotojn kaj postulis, ke ili direktu la flugon al Romo.

Instancoj kaj en Italio kaj en Albanio ekzamenas flughavenan sekurecon. Sed ŝajne ĉiuj antaŭflugaj kontroloj en Tirano estis neriproĉeblaj: la turko ne portis armilon, kiel klare montras flughavena sekureco-filmo. Tamen eraris stevardino, kiu ne fermis la pilotejan pordon.

Bardhyl SELIMI

Sekretoj studeblaj

Ekleziaj dokumentoj dum jardekoj kaŝataj fine studeblis, kiam en septembro estis malfermita al historiistoj kaj aliaj interesatoj parto de la Sekreta Vatikana Arkivo. La dokumentoj rilatas al la papeco de Pio la 11a (1922-1939).

La arkivo, alirebla pro iniciato de papo Johano Paŭlo la 2a, tamen retenas siajn sekretojn. Ekzemple ne legeblas la aktaro pri la konklavo, kiu elektis la novan papon en februaro 1922. Tamen disponeblas la notoj rilate la aŭdiencojn de Pio la 11a kun diplomatoj akredititaj ĉe la Sankta Seĝo. Laŭ la ĉefarkivisto, la dokumentoj indikas, kiel rilatoj inter la papo kaj la faŝista reĝimo en Italio eklitis al kolizio.



RICH GIBSON

La kolekto konsistas el milionoj da paperoj en 30 000 diversaj dosieroj kaj kovertoj. Legi ne ĉiam facilas: la notoj pri la diplomataj aŭdiencoj estas mane

skribitaj sur miloj da folioj. Planita estas plurvoluma eldono de la koncernaj dokumentoj.

Silvia GARNERO/pg

Postulataj: pli severaj punoj

Post multjara kaptiteco de Natascha Kampusch [nataŝa kampuŝ], nun 18-jara, la aŭstra registaro planas pli severan punon pro forrabo de libereco. Tiucele, laŭ la ministro pri justico en Vieno, la registaro estigis laborgrupon, kiu prezentos proponojn por fermi truojn en la leĝo koncerne forrabon de libereco kun aŭ sen postulo de elaĉeta mono.

Krimoj, kiel tiu de Wolfgang Priklopil, la forrabinto de Natascha Kampusch, povus esti punataj estontece per maksimume 20 jaroj da malliberigo.

La 44-jara Priklopil forrabis en 1998 la tiam dekjaran knabinon Natascha kaj tenis ŝin ok jarojn en sia hejmo. Baldaŭ post ŝia fuĝo en aŭgusto

2006 li mortigis sin. Pro la fakto, ke Priklopil ne postulis elaĉetan monon, li povus esti kondamnita laŭ la nun valida leĝo al maksimume dek jaroj da malliberigo.

Aŭstraj aŭtoritatoj kaj juristoj emfazas, ke la krimo de Priklopil estas eksterordinare peza. La jurmedicinisto Reinhard Haller kaj la kriminalisto Thomas Müller diris, ke lia psikologia profilo estas nekutima. Wolfgang Priklopil posedis Natascha Kampusch tute kaj volis transformi ŝin en „estaĵon sen volo”.

Evgeni GEORGIEV

REINHARD HOLLKRONENZEITUNG



Natascha Kampusch dum ok jaroj malhavis liberecon.

FINNLANDO

Glaciskulptado

Skulptado de figuroj el glacio ĉiam pli populariĝas en Nordio. Amatoraj glaciskulptantoj spertigas sin reciproke dum pluraj konkursoj, kiuj okazas ĉiuvintre. Iliaj laborinstrumentoj estas motorsegiloj, hakiloj, marteloj, ĉiziloj, skrapiloj. Ofte la skulptantoj mem elpensas kaj faras la plej bonajn skulptilojn. Krome ili bezonas ankaŭ elektron (por varmigi la glacieron kaj prilumi la pretan skulptaĵon) kaj akvon (por kunglui partojn de glacio

MONATO • decembro 2006



KORKEASAAREN ARKISTO/KATJA LEPISTO

aŭ poluri la surfacon). Kompreneble la glaciskulptantoj bezonas taŭgajn vestaĵojn, precipe varmajn gantojn kaj akvo-imunajn botojn.

Materialo por skulptado estas glaciblokoj, transportitaj el iu pura lago kun sufiĉe dika glacisurfaco. La vetero ne ĉiam favoras la glaciskulptantojn. Nur en frosta vetero la reliefoj kaj plej fajnaj ĉizajoj el glacio longe ekzistas. Oni povas uzi ankaŭ malmolajn neĝblokojn, sed tiukaze la skulptaĵoj ne estos

KORKEASAAREN ARKISTO/KIRSI PYNNÖNEN



KORKEASAAREN ARKISTO/KIRSI PYNNÖNEN



KORKEASAAREN ARKISTO/MAURI HELENIUS



KORKEASAAREN ARKISTO/KIRSI PYNNÖNEN



travideblaj. Ili ofte estas pli grandaj kaj povas esti uzataj kiel ludejoj por etulaj grimpantoj kaj glitantoj. Ĉi-okaze oni devas zorgi, ke oni detruu ilin antaŭ ol ili iĝas rompiĝemaj kaj danĝeraj pro la printempa varmo. Ambaŭ specoj de glaciskulptado estas apartaj branĉoj de la konkursoj. Ĉi-lastaj estas gajaj allogaĵoj por familioj kaj soluloj, kiuj ŝatas pasigi sian liberan tempon en freŝa aero.

Ekzemple temo de glaciskulptado-konkursoj en januaro 2006 apud la Zoologia ĝardeno de Helsinko estis medio- kaj bestprotektado. Plej taŭga materialo estis natura glacio, transportita de lapona lago, kies glacio kutime estas dika 80 cm, sed pro la milda vintro ĉi-foje ĝi dikis nur 40 cm. Ne nur finnoj kaj estonoj par-

toprenis en la glaciskulptado, sed ankaŭ ĉinoj el Harbino, mongoloj el Ulanbatoro, germanoj, nederlandanoj kaj unu afrikano el Kenjo. La premioj estis monaj (ili variis de 100 ĝis 1000 eŭroj) kaj objektaj (pokaloj). La unuaj premioj estis aljuĝitaj al nederlandano (skulptaĵo „Mara testudo”) kaj mongolo („Endanĝerigitaj montaraj kaproj”). Aliaj vidindaj skulptaĵoj prezentis raran riverkankron, strigilon kun ido, tri litojn por ursoj, nordan lumon kaj longkruran insekton („Specimeno”), kies maldikaj piedoj rapide degelas. Ĉi-lastaj ŝajnis teknika miraklo kaj gajnis la duan premion. Kroma valora verko („Amikoj”), kiun skulptis ĉinoj, estis figuro de rajdanta maljunulo sub arbo.

SALIKO

Interrete ankaŭ per naciaj literoj

Jam de unu jaro eblas en Finnlando havigi al si interretajn adresojn, kiuj havas ankaŭ nacilingvaj literojn. Eblas uzi literojn de la finna kaj sveda lingvoj (å, ä kaj ö). Ekde aŭgusto 2006 eblas uzi ankaŭ literojn de tri sameaj lingvoj parolataj en Finnlando. La apuda bildo montras la 14 nove permesatajn literojn.

Ankoraŭ relative malmultaj uzis la eblecon, parte pro tio, ke ne ĉiuj retumiloj komprenas la neanglajn literojn. Ekzemple, la plej nova versio 6.0 de *Explorer* ankoraŭ ne scipovas uzi ilin, sed *Mozilla* ja povas. Tamen ekzistas jam kelkaj komunumoj, kiuj uzas sian nomon en nacilingva formo. Ekzemple, la komunumo Alahärmä havas retejon ĉe www.alahärmä.fi. Kelkaj aliaj urboj kaj komunumoj registris por si nacilingvaj nomojn, sed temas nur pri redirektado al la tradicia retejo.

00E1	á	A kun suprenstreko
00E2	â	A kun cirkumfleko
010D	ĉ	C kun pinta hoketo
014B	ĝ	„engo”
0161	ŝ	S kun pinta hoketo
0167	ĥ	T kun trastroko
017E	ž	Z kun pinta hoketo
0111	đ	D kun trastroko
0292	ŝ	„eĵo”
01EF	ŝ	„eĵo” kun pinta hoketo
01E9	ĵ	K kun pinta hoketo
01E7	ĝ	G kun pinta hoketo
01E5	g	G kun trastroko
00F5	ö	O kun tildo

La 14 supersignaj literoj permesataj en finnlandaj retnomoj ekde aŭgusto 2006, kun la respondaj deksumaj koderoj laŭ Unikodo. Ĉi tie estas uzata la libera tiparo Doulos de www.sil.org.

Ekde la komenco de marto 2006 eblas en Finnlando registri sian propran nomon kiel retnomon kun la finaĵo .fi. Pli frue necesis uzi internaciajn retnomojn, ĉar propraj nomoj ne estis permesataj en finnlandaj retnomoj. Oni rajtas registri nur sian propran nomon, kaj inter samnomoj la unua rajtas registri por si la nomon. Aliaj devas uzi aldonajn indikilojn, ekzemple literojn de sia alia antaŭnomo, por distingi inter adresoj. Eblas uzi ankaŭ mallongigojn, se ili ne vundas rajton de, ekzemple, varmarkoposedanto, registrita societo, kompanio aŭ nomo

de alia persono. La petanto de nova retnomo devas mem certigi pri la rajteco de sia retnomo; alie la Komunikila Administracio rajtas nuligi ĝin.

Finnlandaj retnomoj kostas 52 eŭrojn kaj validas tri jarojn. Antaŭ la 1a de septembro 2003 estis registritaj 41 000 retnomoj, kiuj malnoviĝis komence de septembro 2006, se ili ne estis renovigitaj. Du semajnojn antaŭ la limdato ankoraŭ triono el tiuj adresoj ne estis renovigitaj. Nuntempe ekzistas entute pli ol 138 000 finnlandaj retnomoj.

Jukka Pietiläinen

DONACKUPONO

- Donaco por via korespondamiko?
- Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?
- Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

NOVAĴO

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **11,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **23 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **46 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be



Pro multe da arboj ...

Unu hirundo printempon ne faras

Se nur unu arbon vi ie vidas, vi pri arbaro ne pensos. Se tri ... ankoraŭ ne. Se dek ... iuj jes, aliaj ne. Interese estas pripensi, kiom da arboj necesas, por ke ĉiu vidu arbaron. Se unu verkisto aperas en iu regiono, oni pri kulturo ne fanfaronas. Se dek, oni jam pripensas kaj konkludas, ke oni ne povos nei kulturecon de la popolo. Kaj se 893? Nu, tiam oni jam ne postulas altegan kvaliton de ĉiu el ili aparte. Kaj 893 estas la nombro de esperantaj aŭtoroj, prezentitaj en *Ordeno de Verda Plumo*. Pro multe da arboj (aŭtoroj) oni arbaron (kulturon) ne povas ignori. El tiuj 893 + 1 entute 461 + 1 surmetis sian ordenon (foton). La suplementa unu estas la kompilinto de la verko, kiu aperas, ordenita, dorse de la libro.

Verda Edeno

Josip Pleadin, la kompilinto, en tre lirika enkonduko parolas pri parko kun kverkoj, betuloj, salikoj, tilioj, pri diece bela loko de Esperantujo. Pri iu Edeno, do. Kaj vere, Adamon vi renkontos, senkaŝe ... Evon vi devos iom serĉi, sed ŝi estas, eĉ kelkfoje, kun pomo. En la parko estas kelkaj intimaj romantikaj laŭboj, kiosketoj, kie vi konatiĝos kun kortuŝaj vivorakontoj, ĉar la libro certe ne estas memortabulo kun nekrologaj listoj: legu pri Leopoldo Knoedt, legu pri Georgij Deŝkin, legu pri Armand Su ... kaj pri multaj aliaj. La kompilinto volis prezenti vivantajn (eĉ se ili jam mortis) personojn, el sango kaj karno. Je mia miro, mi dum legado konstatis, ke mi dum longaj jaroj kunlaboris kun Ada kaj fakte tre malmulte sciis pri ŝia (antaŭa) vivo.

Fino de kulturo?

Iam mi lernis, ke la apero de enciklopedioj, prihistoriaj verkoj, antologioj estas signo de agonio de iu kulturo. Mi ne kredas tion. Mi kontraŭe opinias, ke tia vicleco montras maturiĝon,

konscion de la popolo pri ĝiaj valoro, ekzisto, energio kaj estonto. Ni preĝu, ke mi pravu! Tre strange estas, ke la kompilinto mencias en sia antaŭparolo, ke li el diversaj landoj ricevis proponon ne okupiĝi pri la temo ... ĉar li povus forgesi gravan nomon kaj tiel ofendi iun. Se la nenomito meritis nomiĝon, tiam li, laŭ mi, ne vundiĝus pro la nenomiĝo. (Li eĉ verŝajne komprenus la ĵusan frazon!)

Juniga efiko de Edeno

Kiam mi rigardis la rozetojn (fotojn) sur la arboj (rozeto en sia PIV-a signifo: ordeno), mi kelkfoje miris kaj ne rekonis la arbon. Unue mi pensis: „Nu, eĉ simio foje rigardas sin en spegulo”, sed poste mi trovis la logikan klarigon. Estante juna (iam!), mi demandis al instruisto, en kiu vivo-aĝo ni aperos en la eterna paradizo. Li, kiu havis ruĝan telefonon kaj do estis tre bone informita, instruis al mi, ke ni tie estos tridekjaraĝaj. Pripensu la teknikajn problemojn por trovi viajn geavojn aŭ bebe mortintan frateton! Supozeble Josip pripensis tion kaj preparas nin, por ke ni rekonu niajn heroojn, tie, malproksime. Cetere, estas ja problemoj! Ankaŭ ne estus bona ideo publikigi serion da diversaĝaj fotoj de sama persono por tiel klare montri ties kadukiĝon!

Nekrologa kolekto?

Parte, sed tio estas neevitebla, la biografietoj fontas el nekrologoj en revuoj, kaj iufoje tio sentiĝas. La plej granda parto de la biografietoj jam mortis, kaj ankaŭ tio ne estas evitebla. Kiom da generacioj jam pasis ekde la estiĝo de Esperanto? La kvina ruliĝas. Samtempe jen alia pruvo, ke ni havas historion! Cetere ... al tiuj, kiuj aĉetos la libron por kompletigi ĝin: oni jam por minimume du enlistigoj povas aldoni mortodaton (Wouter Pilger: 2006-08-15; William Auld: 2006-09-11). Por iuj cititoj la teksto limiĝas al nur kelkaj linioj. Tamen estas bone, ke la kompilinto



enmetis tion, pri kio li disponis; tiel li atentigas pri tiuj aŭtoroj kaj instigas vin al alsendo de mankantaj donitaĵoj.

Neniu leopardo sen makul(et)oj

Eĉ en Edena Parko la ĝentilaj leopardoj havas makulojn: leopardo sen makuloj ja ne estus leopardo. Pri la (iom tro da) tajperaroj mi tute ne volas paroli, ĉar ankaŭ mi mem ja eldonas ... Se oni ĝenerale ne rimarkas la forestantojn, en tiu ĉi libro oni nepre ja rimarkas ilin, ĉar ĉiu leganto aŭ uzanto, kiu prenas la libron enmanen, jam havas en la kapo la nomojn, kiujn li tuj serĉos. Ne ofte li senluziĝos ... aŭ, ni diru, dependas de lia nacieco, ĉu li trovos, kion li deziras trovi, ĉar estas klare, ke ne en ĉiu lando la samideanoj same aktive kaj entuziasme kunlaboris.

Baza verko

La verko meritas sian lokon inter la bazaj fundamentaj verkoj de nia kulturo. Estas mirinde kaj admirinde, ke la kompilinto sukcesis en nur du jaroj jam kunigi tiom da treege utilaj informoj. Mi gratulas lin, kaj mi deziras al li, ke li baldaŭ ricevu tiom da aldonind- kaj aldonend-aĵoj, ke sekvontjare povu aperi 544-paĝa reeldono (la nuna versio: 272-paĝa, 880-grama). Mi forte rekomendas la verkon kiel konsultlibron kaj ankaŭ kiel labordokumenton.

Petro DESMET'

Josip Pleadin: *Ordeno de Verda Plumo (Leksikono pri Esperantlingvaj Verkistoj)*. Eldonis la kompilinto, Ĝurĉevac, 2006. 272 paĝoj kudre binditaj. ISBN 953-96975-5-7.

Prezo ĉe www.retbutiko.net: 30 eŭroj + afranko.



Unu el kvar

unu fiasko al alia. Li renkontis Jozinjon antaŭ kvar jaroj, hazarde en drinkejo, kaj trovis ŝin simpatia.

La komplikaĵo estas, ke Jozinjino akceptas regule en difinitaj tagoj kaj horoj kvar virojn/sinjorojn, kiuj diverstempe, diversloke estis simile logitaj al ŝi kiel Florentin. Tiu lasta scias pri la kvar, sed ĉiu el la aliaj imagas sin sola kaj devas post la murdo esti seniluziigita.

Jen Florentin en embaraso; li asertas esti kurinta en vesto-ŝrankon ĉe Jozinjino je la neatendita alveno de neviditulo – supozeble unu el la kvar, kiu dume pafis Jozinjon. Horon poste, Florentin staras rakontanta tion al la skeptika Maigret.

Lingve? Ni jam kutimiĝis al glata kaj konvena tradukado. Bela solvo estas „ĉiometejo” (p. 104); gratas „li koleras min”, eĉ se zamenhofa. Strangas (p. 74) „kiu lasis sin tiel stulte mortigi”, kiu devintus esti „tiel stulte esti mortigita”. Ĉefa iritaĵo estas intensa kaj intenca ci-

ado, sed necesas pardoni la tradukinton, ĉar la sociaj diferencigoj inter ĉi kaj vi ludas esencan rolon, lumigante la variantajn rilatojn inter Maigret kaj Florentin. Sed reen al la intrigo.

Ne povas manki la konfronta sceno, en kiu Maigret kunvokas al sia oficejo ĉiujn kvar am(or)intojn kaj alian implikiton kune kaj studas iliajn reagojn, dum li klarigas siajn supozojn pri la krimo. Kiel konvenas al la ĝenro, la solvoj riveligigas en la lastaj paĝoj. Nur dek paĝojn antaŭ la fino ni ekscias la motivon – tio ne estis evidenta pli frue – kaj nur tuj en la fino ni scias la farinton. Plia agrabla aĵo por la ŝatantoj de Maigret.

Stefan MACGILL

Georges Simenon: *Amiko el la junaĝo de Maigret*. El la franca tradukis Daniel Luez. Eld. Sezonoj, Kaliningrad, 2004. 128 paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 12 eŭroj + afanko.

Kiel inspektoro, Maigret dum multaj jaroj perdis ĉiun kontakton kun siaj siatempaj lernejoj samklasanoj. Subite anoncas sin la maljuniĝinta versio de la iama klasklaŭno. Tiu flosis tra la vivo, de



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

NOVA!

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afanko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Alfred Nobel:

nobelo inter la sciencistoj kaj lingvistoj

Ĵurnalistoj nomis Alfred Nobel „la vendisto de la morto”, „la viro, kiu faris la militon profitdona”. Kaj tiu Alfred Nobel estis ĉe la bazo de la ĉiujare atribuita pacpremio ... Iom malfacile kompreneble? Aŭ tamen ne ...


Alfred Nobel naskiĝis en 1833 en Stokholmo kiel la tria filo de Immanuel Nobel. Kiam li havis naŭ jarojn, li transloĝiĝis kun sia patrino kaj du fratoj (Robert kaj Ludvig) al Sankt-Peterburgo por ricevi privatan instruadon. Tie plia frato Emil naskiĝis. Alfred ricevis instruon hejme, ĝis li havis dek ses jarojn. Li ne nur estis tre klera pri kemio, sed li estis ankaŭ pasia leganto kaj parolis flue la anglan, germanan, francan, svedan kaj rusan.

Lia patro Immanuel estis arkitekto kaj entreprenisto. Li fondis entreprenon, kiu fabrikis inter aliaj varoj torpedojn. La entrepreno kreskis prospere, interalie pro multaj mendoj de la rusa armeo. En 1859 la entreprenon transprenis la dua filo Ludvig.


La kreo de lia imperio

Dum du jaroj Alfred vojaĝis diversdirekte, interalie al Francio (kie li laboris en laboratorio) kaj al Usono. Post sia reveno li laboris en la firmao de sia patro. En 1859 la entrepreno bankrotis, sed Alfred daŭrigis siajn eksperimentojn kun eksplodaĵoj. Li precipe serĉis metodojn por pli sekura fabrikado kaj pristudis la uzon de nitroglicerino. En la jaro 1864, kiam li havis 31 jarojn, li ricevis la unuan patenton pri sia eksplodaĵo. La industriistoj nomis ĝin la plej granda malkovro iam ajn farita pri la principoj kaj praktikoj de eksplodaĵoj. Malfeliĉe okazis en la sama jaro ankaŭ granda katastrofo. Lia fabriko eksplodis, kaj kvin homoj mor-

tis. Inter ili lia 20-jara frato Emil. Nun ankaŭ bankroto de lia firmao minacis.



La urbo ne volis doni al li novan permeson, kaj pro tio li daŭrigis sian laboron en ŝipokorpo sur la Märla-lago. Kiam reprezentanto de la ŝtatervoj rakontis al li, ke liaj eksplodaĵoj estos uzataj por la konstruo de tunelo, Alfred sciis, ke lia entrepreno estas savita. Post sia unua patento li kolektis pli ol 300 patentojn plejparte rilate dina-



Alfred Nobel

Nitroglicerino, pro kiu al Nobel ĵurnalistoj donis la epiteton „la vendisto de la morto”.

miton kaj la sendanĝeran uzon de ĝi. Aperis eksplodigiloj, kiuj ekbrulas ne de frotado aŭ premado, sed nur de sparkado. Vojkonstruistoj kaj fervojaj kompanioj estis entuziasmaj uzantoj. Ankaŭ en la minekspluatado dinamito pruvas sian grandan utilon, kaj finfine la milita industrio ne povas vivi sen tia materialo. ▶



Nobel-akcio

► La „rusaj Rockefeller“

La fratoj de Alfred, Ludvig kaj Robert, restis en Rusio. Ili komencis komerci nafton kaj ekspluatis kiel unuaj la naftokampojn de la Baku-regiono en

La norvega Nobel-instituto



BJORN ERIK PEDERSEN

la sudo de Rusio. Ankaŭ Alfred investis parton de sia mono en tiu komerco. La sukceso estis preskaŭ senlima. En la komenco de la sepdekaj jaroj de la 19a jarcento ili produktis la unuajn barelojn. Post dek jaroj ilia merkato estis tiel granda, ke la usonaj petrolkompanioj ĉesigis sian eksporton al Rusio. La fratoj Nobel estis konataj kiel la „rusaj Rockefeller“.

Filozofio, verkisto kaj pacemulo

Alfred Nobel forte interesiĝis pri literaturo. Kiam li havis 17 jarojn, lia patro proponis al li studvojaĝon al Usono. Ekzistis tamen kondiĉo: li rajtas foriri nur se li promesas rezigni pri siaj planoj iĝi verkisto. Tion li faris, sed lia emo al la skribkulturo restis. Lia sola teatraĵo, *Nemezo*, tragedio en kvar aktoj, estis presita ĵus antaŭ lia morto. Tamen ĉiuj ekzempleroj escepte de tri estis detruitaj tuj post lia morto pro tio, ke la verko estis konsiderata blasfema kaj noca. La unua reala eldono aperis nur en 2003 en Svedio en la sveda kaj en Esperanto (kaj poste en la slovena, tradukita el Esperanto).

Li estis pasia leganto de fikcio kaj havis intereson pri filozofio. Li legis filozofiajn verkojn kun granda atento, substrekis frazojn kaj faris notojn en la marĝenoj. Kvankam tiuj notoj certe ne ĉiam atestas pri originalaj ideoj, ili donas bonan imagon pri lia maniero de pensado. Li komentis ne nur la tekstojn de Platono, Aristotelo kaj Demokrito, sed ankaŭ de Voltaire kaj Darwin. Li notis ekzemple, ke estas malklare, kiamaniere homoj akiras la koncepton de Dio. Aristotelo opiniis, ke la kialo estas timo, Voltaire asertis, ke ĝi estas en la deziro de la intelektularo erarigi simplajn homojn. Nobel parolis respektive pri la filozofaj duboj de Descartes kaj Spinoza, aldirante, ke dubo devas esti la origino de la filozofia pensado.

Teorioj pri kono kaj konakiro vekis lian specialan intereson. Tiamaniere li venis aŭtomate al la tezo de Locke „ĉiu kono venas de observado“, aldonante, ke niaj cerboj estas nefidinda konservejo de niaj observadoj. Tio gvidis lin plue pensi pri la metodo de la scienca pensado. Li notis, ke ĉiu scienca pensado estas bazita sur la observado de similaĵoj kaj diferencoj. Li daŭrigis: „Kemia analizo estas kompreneble nenio alia ol tio, kaj eĉ matematiko ne havas alian fundamenton.“

Historio estas bildo de pasinteco kun similaĵoj kaj diferencoj, geografio montras la diferencojn en la terosurfaco, astronomio estas la studo de similaĵoj kaj diferencoj de astroj, fiziko estas la studo de altira forto kaj movado de objektoj. La sola diferenco estas religio, sed eĉ ĝi baziĝas sur la simila naiveco aŭ trokredemo de homoj. Ankaŭ metafiziko devas trovi sian originon en tia hipotezo de analogioj. Sen troigo, li rajtas diri, ke la observado kaj la esplorado estas la bazo de nia kono. Li povas kompletigi tion kun la vortoj de Humboldt: „Oni iras de observado al eksperimento sur bazo de analogioj kaj konataj leĝoj.“ Alfred Nobel estis konvinkita, ke li uzis tian metodon dum sia eksperimenta laboro.

Kompatinda kreitaĵo

Nobel estis tre humila. Kiam lia frato volis skribi historion pri la familio Nobel kaj petis, ke li verku aŭtobiografion, li



Nobel al Bertha von Suttner:
„Miaj fabrikoj haltigos militojn pli frue ol viaj kongresoj!”

respondis: „Alfred Nobel, kompatinda kreitaĵo, prefere estus mortigita de humana kuracisto, antaŭ sia alveno en tiu ĉi mondo. Liaj plej grandaj virtoj: li purigis regule siajn ungojn kaj ĝenis neniun. Liaj plej grandaj malfortecoj: li posedis nek edzinon aŭ infanojn, nek gajhumoran karakteron, nek sanan avidon.”

Oni rakontas, ke Alfred Nobel akiris la ideon krei premiojn por meritplenaj homoj aŭ institucioj, kiam li hazarde legis sian propran nekrologon en diversaj ĵurnaloj. Ĵurnalista intermiksitis lin kun lia frato Ludvig, kaj la informo estis transprenita senŝanĝe en aliaj gazetoj. En la komunikoj li estis priskribita kiel „la vendisto de la morto”, „la viro, kiu faris la militon profitdona”.

Tamen, eble pro sia intereso pri filozofio, li montris sin dum sia tuta vivo konvinkita pacemulo. Li diskutis ofte pri tio kun Bertha von Suttner. Iam li diris al ŝi: „Eble miaj fabrikoj haltigos militojn pli frue ol viaj kongresoj. Kiam du armeoj povas detrui unu la alian en unu sekundo, ĉiuj civilizitaj nacioj time retiriĝos kaj sendos siajn soldatojn hejmen.”

Ĉu li sukcesis en siaj celoj?

Alfred Nobel neniam havis la iluzion, ke komitato de kvin norvegoj, kiu

ERIC WILCOX



La halo kie la Nobel-premio estas disdonata, en la salono de la Urbo de Oslo.

ĉiujare disdonas la Nobel-premion, vere fondus eternan pacon. La unuajn jarojn la premioj estis atribuitaj al universale rekonataj personoj. Poste ekestis pli da polemiko. Ĝuste tiu polemiko estis eble parto de la sukceso. Tiel en 1938 Adolf Hitler estis nomumita, sed tamen ne gajnis la premion. Henry Kissinger – gajninto de Nobel-premio en 1973 – respondecis pri la bombardadoj en Kamboĝo en 1969 kaj 1970, dum kiuj proksimume 800 000 civiluloj pereis. En 1994 gajnis Jasir Arafat, kiu poste estis akuzita pri terorismo. Ankaŭ pri Begin, iama ĉefministro de Israelo, oni povas dubi. Kion pensi pri Wangari Maathai, kiu ricevis la premion en 2004. Ŝi ne estis vere elektita demokrate fare de la kenja parlamento kun 98 % de la voĉoj. Rimarkinda detalo estis ŝia deklaro: „La aidosa viruso estas armilo, kiun blankaj sciencistoj inventis por ekstermi la nigran rason.” Tiu ĉi deklaro provokis ege indignajn reagojn kaj damaĝis ŝian reputacion.

Oni povas diri, ke la Nobel-premio precipe estas politika elekto kaj

ĝi diras pli pri la elektantoj ol la elektatoj. Klare la spirito de la epoko ludas gravan rolon. Aliflanke oni ne tro relativigu la valoron de la premio. La grupo *Kuracistoj por la evitado de nuklea milito* gajnis la premion en 1985 kaj Joseph Rotblat kun Pugwash en 1995. Tio donis al la du movadoj multe da bonvolo por disvastigi iliajn celojn. La Nobel-premio povas esti mikrofono kun monda atingopovo, kiel en 1996, kiam Ramos Horta kaj la roma katolika episkopo Carlos Belo finfine per la pacopremio altiris la atenton de la mondo al problemoj en sia regiono. La premio ankaŭ povas doni iom da protektado, kiel en 1935 por la germana ĵurnalista kaj pacemulo Carl von Ossietzky. La nazi-reĝimo en Germanio malpermesis al Ossietzky, kiu restis tri jarojn en koncentrejo, iri al Oslo por ricevi la premion. Tamen post la aljuĝo oni alkondukis lin al hospitalo, kie li post du jaroj mortis pro tuberkulozo.

Sendube la premio restas grava simbolo en la homa strebado al paco.

Edward KUSTERS

Toleremo kaj liberecoj en Nederlando

En *MONATO* (2006/3, p. 11) mi esprimis – en formo de „Opinio” – do en iom persone kolorita, iom emocia teksteto – mian konsterniĝon pri la fakto, ke ĝuste s-inon Hirsi Ali oni kandidatis por *pac*-premio. Kelkaj homoj tion ŝajne ne bone komprenis, supozante, ke mi kontraŭas reziston al tiel nomata „virino-cirkumcido”.

Por esti unu fojon por ĉiam tute klara tiurilate: cirkumcido laŭ mia kompreno estas ege praa religia rito en judismo kaj islamo, ĉe kiu oni fortranĉas etan pecon de la (vira!) penisa haŭto simbole al submetiĝo al Dio. Mi aŭdis plurfoje, ke en Usono oni faras ion saman ĉe multaj knaboj mallonge post la naskiĝo, sen ia ajn religia intenco sed pro higieno aŭ pro beleco-idealo. Nu, tio ne interesas min ĉi tie.

Ĉe ina infano fizike ne eblas fari tian saman operacion, ĉar ino ne *havas* peni-

son. Krom tio la Biblio ne petas tion de la homoj, do tute mankas la religia postulo.

Ke en multaj afrikaj triboj ekzistas de multaj jarcentoj la kutimo grave mutili la inajn seksorganojn, nomante tion virino-cirkumcido, estas fakto, kiu komence ne estis ligita al la supre menciita – origina, vera – cirkumcido. Tamen, en la daŭro de la tempoj, iam en afrikaj islamaj regionoj fariĝis kutime „cirkumcidi” ankaŭ inajn infanojn.

Laŭ mi estas bone, ke oni kontraŭbatalu tian kutimon, kiu povas lezi la virinojn por la tuta vivo. Mi do neniel protestas, ke Hirsi Ali ankaŭ kontraŭbatalas tion. Ĉe tio, kiel la plimulto de la nederlandanoj, mi povas nur aprobi ŝian agadon. Ankaŭ multaj islamanoj subtenas ĉi tian ŝian agadon.

Sed efektive, kion Hirsi Ali faradas, estas afero multe pli ampleksa kaj laŭ mi ne nur erara sed danĝera. Kaj ĝuste tial mi estis konsternita, kiam mi legis, ke oni ŝin kandidatis koncerne la temon „paco”

– se temus pri batalo kontraŭ virino-*mutilado*, nu, bone – tion ŝi eble povus meriti. Se aliaj ne meritis la saman premion eĉ pli forte ...

Por mi temas precipe pri tio, kion Hirsi Ali faras en nia *politiko*.

En Nederlando oni konas la tiel nomatan politikan triopon: jen la registaro – la ĉefministro, la ceteraj (vic)ministroj, la reĝ(in)o –, jen la parlamento (en du ĉambroj) kaj trie jen la juĝistaro. Ĉiu el la tri havas siajn taskojn, siajn devojn, siajn rajtojn ktp. Ĉiu el la tri havas propran respondecon, sendepende de la aliaj. La loĝantaro, la civitanoj, havas siajn leĝe garantiitajn libereco-rajtojn – vidu en paragrafo 1 de nia konstitucio: absoluta malpermeso je diskriminacio surbaze de raso, sekso, religio ktp. Laŭlitere la teksto diras: „Ĉiuj kiuj troviĝas en Nederlando estas, en samaj okazoj, same traktataj. Diskriminacio pro religio, kredo, politika opinio, raso, sekso aŭ pro kiu ajn alia kaŭzo, ne estas permesata.” Tio estas

Hirsi Ali kaj ...



Pim Fortuyn ambaŭ defendis la rajton insulti.



klara, ŝajne. Tio eĉ ne limiĝas nur al civitanoj – ne: temas pri ĉiu en nia lando.

Pro kio oni formulis tian artikolon? Ĝi ja estas integra parto de nia nederlanda historio, ĝi ligiĝas intime al la fakto, ke nian landon formis unuavice rezisto kontraŭ la troa ŝtata potenco super la religio: paragrafo 1 de la konstitucio ŝirmas la homojn *individue* kontraŭ la eblo de ŝtata perforto.

Neniam iu ajn ŝtata instanco rajtos devigi kiun ajn homon akcepti aŭ malakcepti iun ajn religion: ĉiu religio estas libera. Neniam ŝtata instanco rajtos diskriminacii iun ajn homon surbaze de ties sekso aŭ seksa inklino: la individuo estas libera sin ligi aŭ ne ligi al kiu ajn alia adolta homo, ĉu gee, ĉu geje. Neniam iu ajn ŝtata instanco povos doni avantaĝojn al iu ajn individuo pro aparteno aŭ ne-aparteno al difinita politika partio.

Kompreneble – ĉio ĉi kondiĉe ke la koncernitaj individuoj ne endanĝerigu la rajtojn de aliaj individuoj aŭ de la ŝtato kiel tuto. Pri tio gardas la juĝistaro – tute sendependa de registaro kaj de parlamento.

Sed ekestis certa problemo lastatempe, eble depost la 70aj jaroj, eble eĉ pli poste: pluraj homoj ekopiniis, ke tiu paragrafo 1 de la konstitucio celas ŝirmi ilin kontraŭ aliaj *individuoj* anstataŭ, kiel estis la origina intenco, kontraŭ ŝtata perforto. Ili ekkutimis rezoni: laŭ la konstitucio mi estas libera – mi rajtas do havi kiun ajn opinion, religian, politikan, aŭ alian ... Sekve mi do efektive rajtas havi kiun ajn opinion. Nu, se mi estu vere libera, mi devas havi la rajton eldiri mian opinion pri kio ajn, kaj pri kiu ajn, ĉie kaj ĉiam, sen iu ajn limigo.

Kelkaj, interalie Pim Fortuyn [fortéjn], tion ege vaste faris. Multaj el la publiko, ĉar tio ofte okazis televide, unuavide eble prenis tion por nova speco de amuzo, kabaredsimile. Post kiam fanatika defendanto de bestorajtoj murdis Pim Fortuyn, kelkaj aliaj, ĉar intertempe vastiĝis akra debato ankaŭ en nia lando pri islamismaj ekstremistoj (bonvolu atenti: tio ne estas simplaj islamanoj sed islamismaj ekstremistoj), ekpretendis la rajton je pleja libero diri kion ajn. Kie ajn, kiam ajn. Ion similan pretendis por si ekzemple Theo van Gogh, kiu ekkuti-



Cirkumcido perfortas homajn rajtojn. En Berkeley (Usono) oni protestis kontraŭ cirkumcido

mis ne plu paroli pri „islamanoj” sed pri „kaprofikuloj”. Kaj tiun esprimon – sufiĉe malafablan, sed eble en la unua elsendo iomete kabaredecan – li uzadis daŭre pri islamanoj, ĉie kaj ĉiam. Je certa momento fanatika islamano murdis lin. Tio ne estas defendebla, laŭ mi: murdi homon neniam estas bone aŭ defendebla. Ankaŭ Korano tion klare diras. Sed certe laŭ nederlanda tradicio, laŭ nia juro, laŭ niaj kutimoj ion similan oni ne faru. Neniam!

Kaj post tio Hirsi Ali, kiu jam kelkajn jarojn kampanjis en televido kontraŭ islamo, religio kiun Pim Fortuyn jam kutimis nomi „degenerinta religio”, „primitiva religio” k.s., – post tio ŝi ekpostulis al si la rajton insulti libere. Laŭ Hirsi Ali, ŝi rajtas publike insulti islamon kiel religion. Ĉar paragrafo 1 de la konstitucio atribuas al ni ĉiuj liberecojn. Ĉar tiamaniere, laŭ la sulko de Pim Fortuyn kaj Theo van Gogh, ŝi nun emfaze kaj ripete – plurfoje televide tion ŝi klare ripetis – postulas al si la plene liberan rajton insulte ofendi islamon tute ĝenerale.

En tio tute ne temas pri tio, ĉu ŝi havu la rajton esti aŭ ne esti membro de islamo aŭ de iu ajn religio aŭ de neniu religio. Tiun rajton kompreneble ŝi havas – tiun rajton havas ĉiu ajn homo troviĝanta en Nederlando. Kaj tute ne temas pri tio, ĉu ŝi rajtas havi iun ajn opinion aŭ konvinkon – kompreneble tiun rajton ŝi havas – vidu supre ...

Temas pri tio, ke Hirsi Ali oftege kaj tre insulte ofendas homojn *ĉar* ili apartenas al islamo. Kaj por multaj homoj, krom tio, estas kroma problemo, ke ŝi estis membro de la parlamento, do parto de nia registara triopo, supre menciita. Tia homo ja devus stari super la partioj, almenaŭ ne sisteme ofendi iun kategorion. Kaj daŭre insulti grandan religion – tio ne estas kongrua al nia nederlanda tradicio, nek al niaj kutimoj, nek al niaj leĝoj. Kaj kiel pastoro mi ne povas pri tio silenti.

Do al mi persone estis vere tre ŝoke, legi ke iu proponis ĝuste *ŝin* por premio pri *paco!*

Gerrit BERVELING

Religioj en Bulgario

La 13an de marto en la rusa kultura-informa centro (RKIC) en Sofio okazis akademia konferenco pri la temo „La religioj en Eŭropo kaj la estonteco de la ortodoksa kristanismo”, organizita de la RKIC kaj de scienco-esplora grupo pri religiaj-filozofiaj paradigmoj, konsistanta el instruistoj en kelkaj bulgaraj universitatoj.

La moskeo Banja Baŝi, konstruita en 1576 fare de la granda otomana arkitekto Sinan, estas la sola funkcia moskeo kiu restas post 500 jaroj da otomana regado en Sofio.



NEENKO LAZAROV

En la konferenco la supera scienca kunlaboranto de la bulgara akademio de la sciencoj Stefan Penov, kiu estas ankaŭ konsilanto de la permanenta parlamenta komisiono pri la konfesioj, prezentis donitaĵojn pri la religioj en Bulgario surbaze de statistikaj esploroj el la jaro 2005, kiuj estis publikigitaj en la gazetaro. Laŭ tiuj ĉi donitaĵoj la situacio de la religioj en la lando prezentiĝas jene: ses milionoj da bulgaroj deklaris esti ortodoksaj kristanoj, sed nur 50 % el ili regule vizitas diservojn. Bulgario kristaniĝis oficiale en 865. Ĝi akceptis la ortodoksan kristanisman de Bizanco dum la regado de princo Boris la 1a, kiu ricevis la kristanan nomon Miĥail (Miĥaelo), la nomon de la bizanca imperiestro. Kano¹ Kubrat (naskiĝis ĉirkaŭ la fino de la 6a jarcento – mortis ĉirkaŭ 650), la patro de la fondinto de la bulgara ŝtato kano Asparuh, tamen jam estis ortodoksa kristano. La ortodoksa kristanismo estas konsiderata kiel tradicia por la bulgara popolo.


La katolikoj en Bulgario estas inter 60 kaj 70 miloj, el kiuj almenaŭ 29 miloj estas unianoj, t.e. ili sekvas la ritojn de la ortodoksa eklezio, sed rekonas la papon de Romo. Kontraste al la ortodoksaj kristanoj 90 % el ili regule frekventas siajn diservojn.

La klasikaj protestantoj estas ĉirkaŭ 50 miloj da homoj. Inter 50 mil kaj 60 mil estas la homoj, kiuj aliĝis al pli novaj sektoj. Ili tamen ne estas pure protestantaj: laŭ la sciencistoj ilia religio estas stranga miksaĵo el judismo, islamo, kristanismo, orientaj religioj kaj malkaŝa okultismo. Pri la plimulto de la sektoj ne eblas difini, ĝuste al kiu konfesio ili apartenas, sed klaras, ke ili gravitas ĉirkaŭ tiel nomataj novepokecaj movadoj. Ili aperis en Bulgario

1. Bulgaraj historiistoj ekuzis la formon „kano” anstataŭ „ĥano”, konsiderante ĝin kiel originan bulgaran titolon.



La monaĥejo de Rila estas ortodoksa spirita centro en Bulgario.



La rusa preĝejo en Sofio

post la 10a de novembro 1989, kiam komenciĝis la proceso de demokratiigo de la lando.

La fakto, ke entute pli ol 100 mil homoj estas ligitaj kun konfesioj netradiciaj por la bulgara popolo, eksplikiĝas per la cirkonstanco, ke 35-40 mil el ili estas romaoj, ĉe kiuj la netradiciaj konfesioj rikoltas grandan sukceson. Laŭ Stefan Penov la kialoj por tio kaŝiĝas en la misiemo, kiu manifestiĝas en disdonado de socialaj helpoj, organizado de sociala patronado kaj kulturaj programoj. La esploro montras, ke ĉirkaŭ 3500 homoj apartenas al judismo.

Islamo

La islamanoj en Bulgario nombras ĉirkaŭ 760 000. Ili estas sunaistoj escepte de 50 mil, kiuj estas moderaj ŝijaistoj. Nur kelkaj centoj da islamanoj estas adeptoj de pli fundamentismaj tendencoj.

Lige kun la donitaĵoj pri la nombro de la adeptoj de fundamentismaj tendencoj en islamo, mi konsideras necesa menci la antaŭ nelonge aperintan bulgarlingvan libron de Veselin Bojkov *La invado de la islama fundamentismo*. En ĝi Bojkov konatigas la legantojn pri tiu ĉi invado en la mondon, en Eŭropon, en Balkanion kaj precipe en

Bulgarian. (Islamo komencis disvastiĝi en Bulgario post la okupo de la lando fare de la Otomana Turkio en 1396. Perforte estis islamigita granda nombro da bulgaroj. Okazis ankaŭ libervolvaj konvertiĝoj interalie pro ekonomiaj konsideroj.)

La aŭtoro atentigas speciale pri manifestiĝoj de islama fundamentismo en Bulgario. Li vidas ilin unue en la streboj de turkaj kaj arabaj fundamentismaj organizaĵoj penetri Bulgariion kaj montras la vojojn de la realigo de tiu penetrado. Krom konspiraj formoj de agado aplikiĝas laŭleĝaj formoj, kiel vizitoj de komisiitoj, registrado de iliaj fondaĵoj, konstruado de dekoj da moskeoj en la montaro Rodopo, disvastigo de literaturo, sendado de junuloj eksterlanden por religia trejnado. Ekde 1990 ĝis nun sume 450 ĝis 500 junuloj finis sian religian edukon eksterlande. Estas konstatite, ke parto el ili lernis kaj lernas ne en ŝtataj, sed en privataj religiaj lernejoj, subtenataj de fundamentismaj organizaĵoj. La selektado kaj sponsorado de la plimulto el ili estas efektivigata ĉefe de tiuj ĉi eksterlandaj islamaj organizaĵoj. Reveninte Bulgariion, parto el ili fariĝas imamoj, instruistoj aŭ aktive aliĝas al la religia vivo de la islamanoj kaj komencas pro-

pagandi islamajn ideojn, fremdajn al la tradicie islama loĝantaro de la lando.

Centroj de la disvastigo de islama fundamentismo estas la islamaj lernejoj, en kiuj estas instruate surbaze de la ŭahabita tendenco de islamo, konfirmanta la ideojn de la radikala islamo. En Bulgario apud la tri oficiale rekonataj islamaj lernejoj ekzistas ok nerekonataj islamaj lernejoj. En la libro tute nature estas pritraktata ankaŭ la agado de iuj radikalaj elementoj en la movado por rajtoj kaj liberoj (laŭ bulgarlingva siglo DPS), kiu dum la lastaj 15 jaroj diversforme partoprenas en la regado de la lando, kaj de aliaj porturkaj naciismaj organizaĵoj en la lando kiel la turka demokratia partio, kies gvidanto Ahmed Kenan malkaŝe alvokas al armita batalo kaj ribelo, kaj la eksterleĝa islama organizaĵo *La Ŝtato estas Kalifejo*, kiu efektivas sian agadon surbaze de islamaj fundamentismaj ideoj.

Esploro inter studentoj kaj lernantoj, instruistoj kaj junaj sciencaj kunlaborantoj montras, ke 71 ĝis 74% el ili havas grandan intereson pri religio kaj teologio. El ili inter 4 kaj 7 procentoj deklaras sin absolutaj ateistoj, kaj la ceteraj aŭ ne havas opinion aŭ estas indiferentaj.

Dimitar HAGIEV

Mia religio

Iam vizitis Togolandon la kolombia esperantisto Ruben Torres. Li demandis min: „Kiu estas via religio?” Mia respondo estis spontana: „Mi ne scias.” Li tuj ridis kaj diris: „Multo estas kaŝita en tiu ĉi respondo.” Li certe pravas.

Mia respondo ne signifas, ke mi scias nenion pri religioj, sed ĝi aludas pri la taŭgeco de la religio, kiun mi praktiku. Kiu ĝi estas? Ne perdu tempon scii la nomon de mia religio. Eble ĝi estos „rilatologio”. Mi naskiĝas en la naturo kaj mi devas vivi en harmonio kun la naturo.

Mi naskiĝis de paganaj gepatroj. Mia patro havis propran voduon¹, sed liaj vortoj ĉiam montradis lin skeptika pri idolaj aferoj. Mia patrino estis verva idolano, sed dum la lastaj jaroj de sia vivo ŝi estis kristano. Mia patro mortis la 8an de decembro 1981 kaj mia patrino la 7an de oktobro 2004. La periodo inter la du mortdatoj estas tre grava por mia vivo: geedziĝo, malapero de karaj homoj, konatiĝo kun Esperanto, studado ktp. Kio pli gravas por mi, tio estas mia lernado pri la vivo, ĉar en ĝi troviĝas ĉio alia.

Koni la taŭgan religion de la mondo estis mia irlero.

Vere, ĝis nun mi ne trovis la religion, kiun mi praktiku. Kiam inter ateistoj mi diras, ke mi ne scias, ĉu Dio ekzistas,

ili konsideras min samkredanto. Min oni konsideras ateisto, kiam en la sama medio mi diras, ke organiziĝi en grupo por havi komunan regularon nur por nei la ekziston de Dio signifas, ke oni neas ne la ekzistadon mem de Dio, sed la neadon de ĝia ekzistado, ĉar ĉio okazas, kvazaŭ oni ne volus rekoni ion, pri kies ekzisto oni ne havas opiniojn.

Mi ne bezonas scii, ĉu Dio ekzistas, por esti en harmonio kun la naturo.

Kie mi estas, tie mi neniam volas esti rimarkata. Mi do faru ĉion, kion la tieaj homoj faras. Se ili iras nudaj, ankaŭ mi iru nuda. Aŭdinte tion de mi, kuzino kristana tuj demandis: „Se vi estas inter idolanoj, ĉu vi manĝos aferojn oferitajn por la idoloj?”

Certe mian respondon al tiu ĉi demando ĉiuj povas scii: „Idoloj ne pretigas manĝojn. Eĉ se ili pretigas manĝojn, ili tion faras, por ke oni manĝu. Se mi ne manĝus, la nutraĵoj povus putri kaj la naturo punos, ĉar la manĝon ĝi donis pere de la idolo aŭ idolanoj.” Strange, ĉu ne? Ne mia respondo estas stranga, sed la konduto de ni, homoj, antaŭ religiaj aferoj. Ni demandu nin, kial ni kredas, kaj certe tie ni trovos diversajn respondojn, kiuj lernigos multon al ni.

Idolanoj esperas nenian vivon postmortan, sed kristanoj jes. Budhanoj celas la nirvanon ktp. Oni pensus,

ke la celtabuloj de la religioj estas malsamaj.

Observante la konduton de homoj vere religieme trankvilaj, sed ne fanatikaj, oni tuj rimarkos, ke ili faras ĉion por esti en harmonio kun la medio, kie ili vivas: observas ĉiujn regulojn, kunlaboras kun ĉiuj ktp. Ili neniam malamas, kaj tiel ili konsideras ĉiujn homfratoj. Ili rekonas la homecon en ĉiuj homoj kaj tiel rilatas al ĉiuj, respektante tiun ĉi homecon. Ili respektas la naturon kaj ĉion en ĝi, ĉar ties ekvilibro ebligas harmonian vivon inter la estuloj kaj estaĵoj, kiuj ĝin konsistigas.

Religio de homoj ne havu nomon aŭ oni simple ne konsideru la nomojn de la religioj, ĉar tio naskas disputojn. Religio estu en la koro kaj igu la homojn vivi en harmonio kun la naturo. Kio estas agrabla al aliulo sen damaĝi ceteran homon, tion ni faru al li. Vere, kiu estas la nomo de mia religio, tion mi ne scias. Eble, ĉar mi ŝatas ĉiam rilati kun ĉio, ĉar mi bezonas, ke kune ni partoprenu en la plibonigo de nia medio, mi elpensus diversajn vortojn por kontentigi homojn, kiuj ŝatas nomojn.² Ĉu „rilatio”, „rilatologio” aŭ „rilatologio” estas taŭgaj vortoj por nomi tion? Eble pliaj vortoj tuj aperos. Tio montras, ke ne vortojn ni bezonas por ligi nin kun aliaj estuloj/estaĵoj de nia naturo, sed niajn sintenojn/agojn, por ke ni estu utilaj al ĉiuj.

GBEGLO Koffi



ERIK CLEVES KRISTENSEN

1. Vodu estas tradicia afrika religio, kiu konsistas el multego da religietoj variaj laŭ la tradicioj de ĉiu socikultura grupo. Ĝi konas multe da dioj, ĉefe naturajn elementojn kiel arbon, ŝtonon, serpenton, sablon, feron, statuetojn ktp.

2. Laŭ la fama latina filozofa Cicerono la etimologio de „*religio*” estas ĉu „esti ligata kun ...”, ĉu „regule aŭ daŭre relegadi”.

ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarketo
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Antverpeno festas pro 100-jara ekzisto de la klubo «La Verda Stelo» per **INTERNACIA RENKONTIĜO**

PROGRAMO : **Elektebleco el paralelaj programoj:**

- ✦ Prelegserio «Kulturo de la Kluba Vivo» kun diskuteblecoj
- ✦ Kunveno de Kunlaborantoj de Vikipedio
- ✦ Turisma programo:
«Esploru Antverpenon» pere de gvidataj vizitoj
- ✦ Vesperaj programoj :
Sabato 26/05/07 - JOMO
Dimanĉo 27/05/07 - Popolmuziko kaj dancado en Moderna Vesto.
- ✦ Festaj manĝoj
- ✦ Tranokteblecoj ĉe Esperantistoj kaj en 3 kategorioj de hoteloj

**Jam nun notu la
daton en via agendo
Pentekosto:
26, 27 kaj
28/05/2007**

**Petu la alsendon de faldfolio kun detaloj ĉe: Esperanto-Antwerpen@esperanto.be
aŭ rigardu : www.geocities.com/esperanto_antwerpen**